

**Usona**  
**Esperantisto** 

**Bulteno de Esperanto-USA - N<sup>o</sup> 2024:2**




**Malantaŭ la kulisoj**



<b>Anoncoj</b>	<b>p.4</b>
Vizitu nian novan retejon! • Ne forgesu voĉdoni! • 2024 E-USA Finance Report • Esperantistaj biciklistoj traveturas Usonon • 2024 Usona Kongreso de Esperanto • Donate to the <i>Esperanto in the USA</i> fund • Gajnintoj de la konkurso "Partoprenu IJK-n" • Lingva defio pri la svahila • Paralela Universo 2024 (p.11)	
<b>Redakciaj rimarkoj, UE 2024:2</b>	<b>p.7</b>
<b>de la redakcio</b> • Logan HALL, Alena ADLER La redakcio ĝisdatigas vin pri kelkaj siaj planoj kaj konstatoj post la unua numero ĉi-jare.	
<b>Prezidanta raporto por UE 2024:2</b>	<b>p.8</b>
<b>de la prezidanto</b> • Brandon SOWERS Esperanto-USA faris multan progreson lastatempe, inkluzive lanĉon de nova retejo, transdonadon de la Centra Oficejo, kaj migradon al nova sistemo por kontado. Plu okazas ŝanĝoj al la bulteno, kaj pluraj gravaj raportoj atendas la Landan Kongreson.	
<b>Mar-Jun Board Activity</b>	<b>p.9</b>
<b>de la estraro</b> Summary of board meeting minutes between March and June 2024.	
<b>Mar-May Expense Report</b>	<b>p.12</b>
<b>de la centra oficejo</b> • Vilĉjo HARRIS Expense report from the CO for March, April and May.	
<b>Solvo - Skota skadrono el N<sup>o</sup> 2024:1</b>	<b>p.15</b>
<b>enigmo-solvoj</b> Solvo de la pasintnumera krucvortenigmo.	
<b>Gaja</b>	<b>p.15</b>
<b>senintenca esperantaĵo</b> • Alena ADLER ... faras onin la vino.	
<b>Krucvortenigmoj</b>	<b>p.16</b>
Tri novaj krucvortenigmoj por vortludemuloj!	
<b>Kobalto-60: Helpema kaj minaca</b>	<b>p.18</b>
<b>scienco</b> • Timothy BORONCZYK Ĉu vi konas la uzojn kaj la danĝerojn de kobalto-60?	
<b>Hundo kiu parolas</b>	<b>p.19</b>
<b>facila teksto</b> • Lee MILLER Ĉu vi kapablas kredi?	
<b>Biciklo en Aŭtujo</b>	<b>p.20</b>
<b>rakonte</b> • Logan HALL Kiel eta fiŝo en granda lago.	
<b>La vivo de Peĉjo</b>	<b>p.21</b>
<b>ŝercoj</b> • Timothy BORONCZYK La tridek-tria en serio de Timothy BORONCZYK.	
<b>Kroniko de eklipsoj</b>	<b>p.22</b>
Usonaj esperantistoj spertis multajn suneklipsojn tra la jaroj – jen kelkaj tiuj spertoj.	
<b>About the suffix <i>-ist-</i> and the words for people in occupations and professions</b>	<b>p.25</b>
<b>language corner</b> • Lee MILLER Every <i>-ist-</i> is an <i>isto</i> , but not every <i>isto</i> has an <i>-ist-</i> !	
<b>Laste aperigitaj de Vinilkosmo kaj laste premiitaj</b>	<b>p.26</b>
<b>muziko</b> Interalie estas novaj eldonoj de Armel Amiot, La Mondanoj, kaj Martin Wiese.	
<b>Mikronoveloj</b>	<b>p.28</b>
Novaj centvortaĵoj!	
<b>Memore al Lusi HARMON</b>	<b>p.30</b>
<b>omaĝoj</b> Ŝi estis ĉiam optimisma, persistema, kreema, gastama kaj sindonema.	

# Anoncoj

## Vizitu nian novan retejon!



Ni ĝojas anonci, ke nia nova retejo estas nun vizitebla!  
<esperanto-usa.org>

Ni ankoraŭ ĝisdatigas la retejon. Ni planas aldoni esperantan version, trajtojn por fari ĝin pli alirebla, kaj pli da arĥivita enhavo el la antaŭa retejo. Ni informos la membraron pri la progreso tiurilate.

Se vi serĉas ion kaj ne trovas ĝin, aŭ vi havas komentojn aŭ proponojn, bonvole sendu mesaĝon al [retejo@esperanto-usa.org](mailto:retejo@esperanto-usa.org).

## Ne forgesu voĉdoni!

La ĉi-jara balotilo estas jam sendita! Eblas voĉdoni por kandidatoj al la estraro kaj pri proponataj ĝisdatigoj al la statuto. La limdato estas la komenco de la Landa Kongreso, sed ne tro prokrastu!



Se vi ne ricevis retmesaĝon de [vote@simplyvoting.com](mailto:vote@simplyvoting.com) kun via unika ligilo por voĉdoni, bonvole kontrolu vian spam-keston. Se vi ankoraŭ ne trovas ĝin, bonvole sendu al ni mesaĝon ([usa@esperanto-usa.org](mailto:usa@esperanto-usa.org))!

## 2024 E-USA Finance Report

The Board has prepared a Finance Report for 2024 which gives a comprehensive overview of Esperanto-USA's finances, intended to clarify our financial situation for any member. This report can be read at [esperanto-usa.org/en/2024/06/17/esperanto-usa-financial-report-2024/](http://esperanto-usa.org/en/2024/06/17/esperanto-usa-financial-report-2024/).

## Esperantistaj biciklistoj traveturas Usonon



Cirilo kaj Roz' en Kebekurbo kun siaj bicikloj

Paro de esperantistaj biciklistoj el Francujo, Cirilo kaj Roz', faras nun sian trian ĉirkaŭmondan biciklo-vojaĝon. Ili iras de Kanado al Argentino, traveturante Usonon dum pluraj monatoj. La itinero en Usono estos inter Nov-Jorkio kaj Teksaso.

Ili tre antaŭĝojas renkonti esperantistojn dum la vojaĝo, kaj eventuale paroli al klubo pri siaj spertoj. Se vi volas gastigi ilin en via urbo, kaj vi loĝas ie en tiu vojo inter Nov-Jorkio kaj Teksaso, bonvole kontaktu ilin!

- Retpoŝtadreso: [planedo3000@yahoo.fr](mailto:planedo3000@yahoo.fr)
- Telefonnumero: +33 6 84 40 53 54
- Vi trovos pli da informo pri iliaj vojaĝoj ĉe ilia retejo, [horizonto.net](http://horizonto.net).

### Itinero (sen fiksitaj datoj):

1. Rochester
2. Albany
3. New York
4. Philadelphia
5. Baltimore
6. Washington
7. Richmond
8. Raleigh
9. Charlotte
10. Atlanta
11. Birmingham aŭ Montgomery
12. Jackson
13. Dallas
14. San Antonio
15. Laredo

# 2024 Usona Kongreso de Esperanto

## Connecting over the History of Esperanto in Hollywood

Elle Beck



The *2024 Usona Kongreso de Esperanto* in Los Angeles promises a vibrant mix of educational opportunities, fun experiences, and community building. This year will be a celebration of the impact Esperanto has had on films, tv, and science fiction and feature a diverse array of lectures, workshops, and social events.

### Conference Highlights

**Lectures and Workshops:** Attendees will engage in various sessions designed to deepen their understanding of Esperanto. Topics will range from engaging sessions of history to group cooking workshops to practice your Esperanto in everyday life.

**Beach Dinner Party:** A quintessential Southern California experience, this social event will allow participants to relax and connect against the backdrop of a stunning sunset.

**Mini-NASK Course:** For post-beginners and intermediate Esperantists, the Mini-NASK offers intensive learning with sessions on Friday afternoon and Saturday and Sunday mornings.

**Pre- and Post-Conference Excursions:** Starting July 8 and extending through July 16, attendees can join excursions exploring iconic Southern California landmarks. Highlights include:

- Cheering on the Los Angeles Angels baseball team as they take on the Texas Rangers
- Touring Hollywood, Chinatown, Griffith Park Observatory, and more in a day trip to Los Angeles
- Enjoying the magic of Disneyland
- Discovering the beauty of the quaint island getaway, Catalina Island

- Exploring the historical Queen Mary with a private ham radio demonstration
- Being mesmerized by beautiful underwater creatures at the Aquarium of the Pacific

California State University Dominguez Hills in Carson, CA, boasts one of the largest Esperanto archives in the United States, offering attendees a unique opportunity to delve into the language's rich history. The university's sustainable design and beautiful campus spaces provide a serene setting for the conference.

Registration is still open until the beginning of the conference. For seasoned Esperantists and those new to the language, the *2024 Usona Kongreso* will be a great opportunity to connect, grow, and be immersed in the rich culture of Esperanto.

**Email:** [Landa.Kongreso@Esperanto-USA.org](mailto:Landa.Kongreso@Esperanto-USA.org)

**Website:** [UsonaKongreso.org](http://UsonaKongreso.org)

---

## Donate to the *Esperanto in the USA* fund

The matching donations program through the Esperantic Studies Foundation (ESF) has been renewed for 2024! ESF will match a total of \$5000 in donations earmarked for E-USA. When you donate to E-USA through ESF, your donation will be matched dollar for dollar. The matching funds are intended to be used to provide direct benefit to E-USA members and in the past have been crucial to the success of the *Usona Bona Film-Festivalo*. Please donate to help us continue to fund Esperanto activities and programs in the United States!

**Donate today!**



<[mallonge.net/ESF-EUSA](http://mallonge.net/ESF-EUSA)>

# Gajnintoj de la konkurso

## “Partoprenu IJK-n”



TEJO ĝojas anonci la plenan liston de gajnintoj de la konkurso “Partoprenu IJK-n 2024”!

**Espoir Ngoma Kasati** · Demokratia Respubliko Kongo

**Kaleth Ochoa Rojano** · Kolombio

**Santiago Esmeral** · Argentino

**Ŝujano Hou** · Ĉinio

**Logan Hall** · Usono

La Fonduso *Partoprenu IJK-n* de TEJO subtenos ilian vojaĝon al Ŝventoji, Litovio por partopreni kaj kunlabori al la plej mojosa evento de la jaro, la Internacia Junulara Kongreso 2024. Gratulon al la venkintoj kaj bonan vojaĝon!

Pluraj junaj esperantistoj el ĉie en la mondo partoprenis en la konkurso. Ni varme dankas ĉiujn pro ilia partopreno!

Ĉu vi volas subteni la Fonduson por helpi pli da junuloj de ĉie partopreni en la IJK? Skribu al [ijk2024@tejo.org](mailto:ijk2024@tejo.org)!

Mi dankas TEJO pro ĝia malavara subvencio kaj pro ĝia akcepto de mi en la ĉi-jaran Junularan Kongreson! Ĝia konkurso estas tre grava oportuno por engaĝi junulojn en la movado, kiuj aliokaze ne povus. Antaŭĝojas mi renkonti la aliajn gajnintojn kaj krome la aliajn kongresantojn en Litovio.

Mi dankas ankaŭ E-USA, sen kies helpo mi ne povus partopreni, inkluzive de aparta monhelpo, de loĝistika aranĝado, kaj de tre afablaj rekomendletoj kaj de Brandono SOWERS kaj de Amanda SCHMIDT, kiuj solidigis mian gajnon en la konkurso.

Kiel partoprenanto mi esperas redoni kiel eble, per laboro rilate al la kongreso kaj per ligo en la internacia junulara movado. Atendu artikolon pri mia sperto en venonta numero de *Usona Esperantisto*! -LH

# Lingva defio pri la svahila

Ĉu vi akceptus la defion lerni lingvon en nur 50 tagoj? Nun vi havas la okazon – kaj aldone, se vi venos al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), vi povos gajni premiojn pro tio! Universala Esperanto-Asocio (UEA) lanĉas la defion “*Lernu la svahilan en 50 tagoj antaŭ la 109-a UK*”!

La 109-a UK okazos de la 3-a ĝis la 10-a de Aŭgusto 2024 en Aruŝo, Tanzanio – lando, kiu havas la svahilan kiel unu el siaj oficialaj lingvoj. La svahila – aŭ *Kiswahili*, foje en Esperanto ankaŭ “sŭahila” aŭ simple “suahila” – estas la bantua lingvo kun la plej granda nombro da parolantoj kaj estas unu el la laborlingvoj de la Afrika Unio!

Ĉu vi pretas? La defio komenciĝis la 15-an de Junio 2024, kaj finiĝos dum la 109-a UK en Aruŝo. Por formale partopreni, plenigu tiun ĉi [formularon](https://forms.gle/8TBWF8HntNzf589) (partoprenantoj devas esti plenaj komencantoj en la svahila). Konkursantoj, kiuj venos al la 109-a UK, pruvos siajn kapablojn en parola ekzameno (ne zorgu, ĝi pli similas al neformala konversacio), kiu konsistas el mallonga prezento (1-2 minutojn) kaj konversacio kun nia ĵurio. Kriterioj, pri kiuj oni estos testita, estas flueco, interago, gramatika precizeco kaj vortprovizo. Sukcesintoj en la ekzameno gajnos bonegajn premiojn! (Se vi ne venos al Aruŝo, ni tamen kuraĝigas vin partopreni kaj mem doni al si la okazon eklerni tiun fascinan lingvon!)

Por helpi vin eki, ni rekomendas kelkajn rimedojn:

1. la apon *uTalk*, per kiu vi povos **senpage** dum ses monatoj lerni la svahilan: <https://uta.lk/esperanto>
2. la kursojn de Esperanto per la svahila troveblaj en [UEAviva](https://www.youtube.com/@UEAviva) <[youtube.com/@UEAviva](https://www.youtube.com/@UEAviva)>
3. praktikan konversacion kun samideanoj el Afriko, kiuj pretos subteni vian lernadon

UEA deziras al ĉiuj eklernantoj bonŝancon! *Bahati njema!*

Ĉi tiu anonco estas adaptita de Gazetara Komunikado de UEA laŭ ĝia permesilo CC BY 4.0.

La redakcio varmkore kuraĝigas ĉiujn legantojn profiti de la ĉi-supraj iloj, kaj atentigas pri la haveblo de vortaro, gramatiko kaj kompara analizo ĉe la retbutiko de UEA:

Vortaro: <<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=5057>>

Gramatiko: <<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2100>>

Analizo: <<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=5870>>

# Redakciaj rimarkoj, UE 2024:2

de la redakcio • Logan HALL, Alena ADLER

La redakcio volas danki ĉiujn legantojn pro la afablaj komentoj kaj rimarkoj koncerne nian unuan numeron! Ni ĝojas vidi ĉies pasion pri la kvalito de Usona Esperantisto, kaj ni esperas nutri tion plu.

La 20-an de Aprilo, ni havis oportunon paroli ĉe ViA pri nia sperto rilate al la unua numero, kaj pri niaj atendoj estontece; ĉe la Jutub-kanalo de E-USA estas registraĵo de la parolo. Ni tamen volas jen lumigi la ĉefajn aferojn por la tuta legantaro, inkluzive kelkajn novajn.

## Pri limdatoj

Antaŭe, la redakcio havis du limdatojn: unu por submeti al la venonta numero, kaj unu por prespretigi la numeron, post kiam ŝanĝoj ne eblas. Ni aldonos trian limdaton, post kiam evento devos okazi, por ne esti eksvalida se reklamita en la bulteno. Ni volas elimini situaciojn, en kiuj evento jam okazis antaŭ la ricevo de la papera bulteno; tiajn eventojn ni proponos publikigi nur al la reta versio.

Limdatojn ni ankoraŭ ne antaŭfiksas ĝis post kelkaj numeroj pli, ĉar ni devas alkitimiĝi al la procedo, inkluzive flanke de nia presejo. Poste ni intencas iam starigi kalendaron ĉe la retejo. Ĉiuokaze ni plu rimarkigos pri la venontaj limdatoj ene de ĉiu numero, en la kolofono.

## Pri numeroj

Por fleksebleco, ni ne plu nome rilatos numerojn al specifaj monatoj, kaj konsekvence la nombroj mem sekvos simplan vican ordon. Ekzemple, kio estis *20xx:1*, *20xx:2-3* (*duoble granda*), *20xx:4*, tio estos *20xx:1*, *20xx:2* (*duoble granda*), *20xx:3*.

Malgraŭ tio, ni promesis, ke ni strebos plu sekvi pli-malpli dumonatan kadencon. Tamen, post buĝeta esploro de la estraro interkonsile kun ni, *Usona Esperantisto* revenas al kvar numeroj jare, t.e. po unu trimonate. Vi povas legi pli pri la decido en la prezidanta raporto kaj en la estrara protokolo de Majo.

Ni konscias, ke membroj jam deziris pli oftajn aktualigojn, ne malpli. Por trakti tion ni esperas afiŝi al la retejo kiel eble pli ofte, kvankam ni ankoraŭ serĉas ritmon. Krome, ni komencas kunordigi afiŝojn kun la Komitato pri Komunikado por dividi niajn retajn artikolojn al sociaj platformoj, kaj por adapti gravajn informojn el aliaj fontoj en la bultenon pli regule.

## Pri la paperformo

Ni tre fieras pri tio, kion ni povis sendi al ĉiuj membroj kiel nian unuan numeron! Tio estis nur la komenco. Per viaj kritikoj ni povos plibonigi venontajn numerojn; jen kelkaj rimedoj, kiujn ni jam komencas efektiviĝi:

- La marĝenoj estu pli larĝaj.
- Ni esploras aliajn elektojn pri papero rilate al pezo, rigideco kaj kosto.
- Aŭtoraj biografietoj aperos kune je la fino de ĉiu numero, anstataŭ malkohere sub koncernaj verkoj.
- QR-kodoj ĉiam havu ligilon subskribitan. Kiam eble, tiuj kodoj kaj mallongigitaj ligiloj estos kreitaj per *mallonge.net*.
- Ni klopodos alĝustigi bildojn kaj logotipojn por videbleco sen kolora inko.
- Tekstoj estu fasonitaj pli kohere, kun malpli da ŝanĝoj al grandeco kaj interspaco.

## Pri artefarita intelekto

En N<sup>o</sup> 2024:1, ni petis opiniojn pri uzoj de artefarita intelekto en la bulteno. Ĝis nun ni malmultajn opiniojn ricevis, kaj kun la daŭra aperado de novaj, pli kapablaj modeloj (ekzemple GPT-4o), la redakcio plu diskutas inter si. Ni ne pretas anonci iujn ajn postulojn, sed ni plene intencas iam publikigi gvidliniojn por lasi al aŭtoroj kaj al legantoj nenium dubon pri tio, kio povas troviĝi en la bulteno.

Dumtempe, ni volas rimarkigi pri aktualaj normoj:

- Por la kovriloj ni favoras homajn verkojn de la membraro.
- Bildoj faritaj per AI povas akompani verkojn, preferinde fikciajn, kiuj aliokaze ne havus.

Se vi havas opinion ĉi-teme, ni ankoraŭ petas; sendu al [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org), kaj rimarkigu al ni, ĉu vi volas aŭ permesas publikigi viajn pensojn en la bulteno por la leterkesto!

# Prezidanta raporto por UE 2024:2

de la prezidanto • Brandon SOWERS

Karaj membroj kaj legantoj,

Mi ĝojas raporti pri la konkreta progreso de Esperanto-USA dum la pasintaj monatoj. Estas pluraj gravaj atingoj, pri kiuj ni povas fieri.

Unue, kiel multaj el vi verŝajne jam rimarkis, ni lanĉis freŝe fasonitan retejon ĉe [esperanto-usa.org](http://esperanto-usa.org), kun nova aspekto. Ĝi estas konstruita per *WordPress*, moderna sistemo, kiu ne postulas profundajn informadikajn sciojn, kaj do estos multe pli daŭripove mastrumebla estontece. Ni celis rekrei ĉiun gravan funkcion de la malnova retejo sen troa balasto. Rekomencinte per io simpla, estas multe pli facile aldoni novajn trajtojn, kiel ekzemple la afiŝon de la protokoloj de la estrarkunsidoj rekte sur la retejo. Ni esperas, ke ĝi plaĉos al vi, kaj ke vi trovos ĉion, kion vi serĉas.

Dum mi tajpas, la kongreso en Losanĝeleso (12-14 Julio) estas baldaŭ okazonta; eble kiam vi havos en viaj manoj la paperan ekzempleron de la bulteno, vi estos haste pakanta kaj kontrolanta, ke restas spaco en via valizo por novaj libroj. Jam aliĝis pli ol 75 homoj. Estas tre eble, ke ni atingos 100 partoprenantojn, kio estus unu el la plej grandaj kongresoj en Usono dum jardekoj.<sup>1</sup> Mi esperas vidi kiel eble plej multajn el vi tie. Kaj ni jam komencas plani por la venonta jaro: la Esperanto-klubo de Toronto, Kanado invitis nin okazigi nian Kongreson tie en 2025 kadre de “Dulanda Kongreso”, invito, kiun ni akceptis. Estas jam evidente ke la teamo estas tre kapabla kaj energia, kaj ke oni povos atendi tre interesan kongreson en 2025.

La losanĝelesa Kongreso markos novan ĉapitron por nia organizo. Post preskaŭ dujardeka deĵoro, Bill HARRIS, la Direktoro de nia Centra Oficejo, emeritiĝos. Amanda SCHMIDT, kiun ni dungis en Januaro por prepari por tiu transiro, plene okupos la oficon de post la Kongreso. Estis amaso de aferoj farendaj por prepari por tio, multe pli ol iu ajn imagis anticipi. Tamen, Bill kaj Amanda diligente kunlaboris dum la pasintaj ses monatoj, kaj preskaŭ ĉio traktenda estas jam farita, aŭ baldaŭ estos.

---

<sup>1</sup> Laŭ Vikipedio, la Kongreso en Aŭstino en 2005 havis “95+ partoprenantojn.” Mi persone ĉeestis mian unuan Kongreson nur en 2006, en Nov-Jorko, do mi bedaŭris, ke mi ne helpis la aŭstinan atingi 100.

Ĉi-monate, Amanda kaj Bill laboras kun profesiuloj por prepari konverton de nia historio en *QuickBooks Desktop* al pli moderna, rete alirebla versio, *QuickBooks Online*. Tio profunde faciligos multajn taskojn rilate al librotenado kaj raportado pri niaj financoj.

Simile, ni sukcese migrigis la datumojn de la membro-datumbazo, kiu estis en la komputilo de Bill, al *Salesforce*, moderna, rete alirebla datumbazo, kiun ni ricevas senpage kiel neprofitcela organizo. Per *Salesforce*, estas tre facile krei diversajn raportojn pri niaj membroj, inkluzive pri tendencoj en la kvanto da membroj, kiuj pagas la jarkotizon. Tio ebligis fari komparon pri la kvanto da jarkotizoj ricevataj por la sama periodo dum la lastaj jaroj. Estas okulfrape evidente, ke por la jaroj 2017-2023, estis ĝenerala tendenco al malkresko - sed por la jaro 2024, ni spertas kreskon de 36% kompare al 2023, kaj jam revenis al la nivelo de 2019, renversinte kvar jarojn da falo. El la diferenco de 63 jarkotizoj kompare al 2023, 20 estas de la kongres-aliĝilo kaj 9 estas de la QR-kodo, kiu aperis sur la kovrilo de la pasinta bulteno.

*Komparo inter kvantoj da jarkotizoj ricevataj inter  
Januaro-Majo, 2017-2024*

Jaro	Jarkotizoj pagitaj ĝis fino de Majo
2017	250
2018	249
2019	238
2020	206
2021	211
2022	191
2023	175
<b>2024</b>	<b>238</b>

2024 estas jaro de multaj ŝanĝoj en nia bulteno. La jena raporto formos parton de la dua numero sub la nova redakcio de Loĉjo kaj Alena. Estas multaj aferoj, kiujn ni jam lernis post la unua numero, kaj tiu lernado certe estos daŭra, dum ili ĉiam strebas produkti kiel eble plej interesan, utilan, informoplenan, allogan, kaj edukon bultenon. Mi volas nur substreki kelkajn punktojn:

- Post la unua numero, la estraro konsideris la amason da laboro, kiun ili faris, kaj kiel tion rekompenci kiel eble plej juste. La estraro decidis, ke por nun, ni fiksu la pagon je **po 500 \$** al ambaŭ redaktoroj por ĉiu numero.



- La estraro decidis ankaŭ, ke estas sencohave plani je **kvar numeroj jare**. La kutimo dum pluraj jaroj estis aperigi ses numerojn jare, kvankam la statuto postulas nur kvar. Ni kredas, ke kun la pli vasta uzo de retaj informiloj, kaj kun aktiva Komitato pri Komunikado, Esperanto-USA povos trovi aliajn manierojn informi la membraron pri urĝaj ĝisdatigoj inter bulten-numeroj, kaj ke la bulteno fokusiĝu je gravaj informoj kiuj formu la kronikon de nia movado, kune kun interesaj artikoloj. Tiel ni celas ankaŭ simpligi kaj moderigi la tutan jaran elspezon por la bulteno.
- Ni daŭrigas la ekspedon de la bulteno al ĉiu numero, kiel la statuto postulas. Rilate al la kosto, estas pluraj manieroj, per kiuj ni **malaltigas la po-ekzempleran koston**:
  - La po-paĝa pres-kosto estas **malpli ol duono de tio**, kiom ĝi estis antaŭe, ĉar ni laboras kun profesia presejo kiu funkcias pli efike kaj ekonomie ol antaŭe.
  - La po-ekzemplera eksped-kosto estas proksimume **triono de tio**, kiom ĝi estis antaŭe, ĉar ni restaŭris specialan neprofitcelan statuson, kiun ni havis ĉe USPS sed perdis antaŭ jaroj.
  - Ni ne laborigas la Direktoron de la Centra Oficejo por prepari nek ekspedi la presitajn ekzemplerojn, kio kutimis postuli **plurajn horojn por ĉiu numero**. Tio estis 'kaŝita' kosto en la antaŭa sistemo, sed kosto ĉiuokaze. La preparadon kaj ekspedadon nun faras presejo, kaj ni kredas, ke ĝi faras multe pli efike.

Konsidere, ke ni antaŭe sendis la bultenon al inter triono kaj kvarono de la membroj ses fojojn jare, la proksimuma kosto por nun sendi al ĉiu membro kvar fojojn jare estas tre komparebla (ni havos pli precizajn ciferojn post la presado de ĉi-dua numero, kaj prezentos tiujn dum la Kongreso). Tamen, mi kredas, ke la efektiva engaĝiĝo de niaj membroj estas multe pli alta. Tion montras la kotizoj ricevitaĵ pere de la kovrila QR-kodo, kaj ankaŭ la pluraj pozitivaj komentoj, kiujn ni ricevis pri la unua numero. Se vi havas komentojn aŭ ideojn pri la bulteno, bonvole komuniku kun ni; des pli bone se vi povus fari tion dum la Kongreso!

Kaj do, mi finas la nunan raporton revenante al la Kongreso. Ni aranĝos plurajn laborsesiojn pri diversaj temoj gravaj al nia organizo, kiel la bulteno, niaj financoj, nia eduka agado, kaj simile. Tiuj laborsesioj okazos paralele al aliaj interesaj kaj amuzaj prelegoj, kaj vi ĉiam povos elekti, kiujn partopreni. Ni esperas, ke vi portos viajn ideojn pri la temoj, kiuj plej interesas vin. Ni ankaŭ sendos informon al la membraro pri la stato de la organizo rante de la Kongreso, por ke vi povu engaĝiĝi informite. Tre baldaŭ aperos Financa Raporto plenplena de informo pri la financa situacio de la organizo. Dum la venontaj semajnoj, ni preparos ankaŭ la Jarraporton por la Kongreso, en kiu ni konkrete reliefigos la diversajn atingojn de la asocio dum la jaro.

Ĝis Losanĝeleso!

Brandon SOWERS

## Mar-Jun Board Activity

de la estraro

---

To conserve space, the newsletter includes only the summary and links to read the full minutes online. The full meeting minutes (including discussions) are provided on E-USA's website.

---

### January (Board activity missed in previous issue)

**Proposal:** The Board appoints Jonathan Thomas as Esperanto-USA's representative to Universala Esperanto Asocio's "Amerika Komisiono" for the year 2024. As our representative, Jonathan shall stay in regular contact with the President, or another board member delegated for the task, about the activity of the Amerika Komisiono and his activity within it. If there are substantial matters to be decided on, Jonathan shall communicate about these and

ask for guidance. The Board asks that Jonathan write a report at least quarterly which can be shared with the membership or published in the bulletin. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** Proposals for Bylaw Amendment Regarding Editor Appointment

- **Sub-Proposal 1:** Clarification of Editor Appointment Procedures
  - The wording "The editor shall be named by the President and serve at the pleasure of the Board"

shall be amended for clarity in future appointments. (Yes/No)

- **Sub-Proposal 2:** Alternative Wording Options
  - If Proposal 1 passes, select the preferred wording for amendment: (Option A / Option B)
    - Option A: “The editor serves at the pleasure of the Board after being appointed by the President and confirmed by the Board.”
    - Option B: “The editor serves at the pleasure of the Board after being duly appointed by the President.”
- **Sub-Proposal 3:** Restructuring of Section XI
  - In an effort to better organize Section XI, the following re-ordering will be proposed to the membership for approval: (Yes/No)

Section XI – The Official Organ

§1101. The official organ of the League shall be issued at least quarterly.

§1102. The name and format of the League’s organ shall be determined by the Board or by action of the Congress.

§1103. Material to appear in the official organ shall be chosen by the Editor with the advice of the President and/or Board as required.

§1104. No material of political, religious, ideological, or tendentious nature shall appear in the organ unless the subject clearly pertains to the language problem.

§1105. <text approved in Proposal 2>

Sub-proposal 1 passes with 6 votes in favor, 1 opposed, and 3 abstentions.

Sub-proposal 2 passes with 6 votes in favor and 4 abstentions.

Sub-proposal 3 passes with 6 votes in favor and 4 abstentions.

**Proposal:** Updated Esperanto-USA logo – Applying modern design practices to Esperanto-USA’s logo ensures it continues to present a recognizable identity but also a sense of modernity, approachability, and professionalism. (Option A / Option B)

5 votes were placed in favor of option A and 2 in favor of option B, with one abstention. A decision was not declared, and the motion was tabled.

**Proposal:** Create an Education Committee, and charge it with exploring, evaluating, and implementing appropriate

initiatives to provide educational opportunities and resources to Esperanto learners in the U.S. in accordance with the stated goals and mission of Esperanto-USA. This proposal passes with 7 votes in favor and 2 abstentions.

## March

**Proposal:** Re-establish Membership Committee from now until the 2025 Kongreso, composed of Peggy Dolter (chair), Murray Murner, Fred Meyer, Elle Beck, and Jefferson Pierce. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** To designate the CO Director as “Key Controller” ex officio to enable collaboration with Morgan Stanley on Esperanto-USA’s behalf.

**Proposal:** To designate the President and Treasurer as “Authorized Individuals” ex officio to enable collaboration with Morgan Stanley on Esperanto-USA’s behalf.

**Proposal:** To confirm Gary Grady as an Authorized Individual with Morgan Stanley and advisor to the Treasurer and Finance Committee through July 2025.

The proposals (3) pass unanimously.

**Proposal:** To transfer responsibility for directly managing the restricted publishing funds to Ruth in her capacity as educational commissioner. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** To accept the convention travel reimbursement policy. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** Authorize the CO to hire a summer intern. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** To present the proposal for a full Bylaws replacement/revision to the membership for their consideration, wherein it may be edited prior to its inclusion on the ballot. Specifically, to share this document with the membership and solicit feedback prior to the board’s next meeting in April. The proposal passes unanimously.

(Full minutes for March 10)

<esperanto-usa.org/en/2024/03/10/board-meeting-minutes-march-2024/>

(Full minutes for March 16 - Special Meeting on Bylaws Proposal)

<esperanto-usa.org/en/2024/03/16/board-meeting-minutes-special-meeting-march-2024>

## April

No proposals were voted on at this meeting.

(Full minutes for April)

<esperanto-usa.org/en/2024/04/14/  
board-meeting-minutes-april-2024/>

## May

**Proposal:** That Esperanto-USA allow Amanda Schmidt to be bonded and access the bank account. The proposal passes by acclamation.

**Proposal:** To set the rate of compensation for editors at \$500 per editor (with no more than two editors) per issue, with four issues per year, to be reviewed no later than March 2025, when the Director of the CO will present such a review to the board. The motion passes unanimously.

(Full minutes for May)

<esperanto-usa.org/en/2024/05/11/  
board-meeting-minutes-may-2024/>

## June

**Proposal:** Discontinue the practice of automatically approving board minutes, recognizing their status as legal documents requiring thorough review. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** The Board will present the recommendations from the Membership Committee at the Landa Kongreso and send it out to the membership shortly, with the addition of having the youth membership cut off at age 25 instead of age 30, and including a combined youth for UEA and TEJO membership at \$50. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** Accept the invitation to hold our Annual Congress in 2025 in Toronto as part of the Dulanda Kongreso. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** Incorporate the Appropriate Account Use to the official policies of Esperanto-USA pending updates by Quintyn to reflect discussion. These policies will be subject to at least annual review by the Board to ensure continued relevance and compliance. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** Incorporate the Social Media Code of Conduct to the official policies of Esperanto-USA pending updates by Quintyn. These policies will be subject to at least annual review by the Board to ensure continued relevance and compliance. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** Merge all funds from the Swenson Bequest into Esperanto-USA's brokerage account.

**Proposal:** Consolidate the Gibson Fund into the General Fund, as the Gibson Endowment income has been allocated there already.

**Proposal:** Merge the Unrestricted Publishing Fund into the General Fund.

**Proposal:** Direct income from Esperanto-USA's brokerage account to only the General and Endowment Funds.

**Proposal:** Create a comprehensive budget for 2025.

All five above proposals pass unanimously.

**Proposal:** Allocate up to \$1000 for a retirement gift for Bill, with up to \$200 used for a physical gift to be presented at the 2024 Annual Congress, and the balance to be paid as a bonus on his final paycheck. The proposal passes unanimously.

**Proposal:** Approve Amanda Schmidt to work up to 50 hours per two-week pay period through the end of August, with no more than 40 hours in any given week, and with an exception allowing for additional hours as needed for the pay period containing the Congress. Beginning in September, the Board expects that she will be working an average of 40 hours per two-week pay period. The proposal passes unanimously. (Full minutes for June are pending approval; check <esperanto-usa.org/en/arkivo-archive/>)

---

## Paralela Universo 2024

anoncoj

### Kio ĝi estas?

Paralela Universo estas unu-taga festo de Esperanto, okazanta en diversaj lokoj samtempe. La eventoj inkluzivos tagmanĝon, grupan agadon kaj vespermanĝon, kaj daŭros proksimume de 12:00 ĝis 20:00.

### Kial ĝi estas?

Por doni al vi la oportunon paroli Esperanton nerete, renkonti novajn amikojn, kaj fari ĝuindajn memorojn. Nia celo estas ke ĉiu, kiu volas partopreni, povos, sen vojaĝi tro for. Ni celas, ke oni povu atingi eventon malpli ol kvar horojn for.

### Kiam ĝi estos?

PU kutime okazas dum la tria sabato de Aŭgusto. Ĉi-jare tio estos **sabate la 17-an de Aŭgusto, 2024.**

<paralelauniverso.com>

# Mar-May Expense Report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

For brevity, expenditures of less than \$10 are omitted and summed at the end of each month. Contact the Director of the Central Office at eusa@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our Restricted Funds are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

## March

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2024-03-05	BOA CC 7572	10.95	Internet Access	Dreamhost
2024-03-05	BOA CC 7572	20.00	Member Mailing Expenses	Mailchimp
2024-03-05	BOA CC 7572	26.43	Cost of Catalog Sales	packing materials
2024-03-05	BOA CC 7572	40.00	Bulteno - Print & Post	envelopes to send large bulletin
2024-03-05	BOA CC 7572	40.00	Credit Card Expenses	Paypal payment for Payflow
2024-03-05	BOA CC 7572	44.84	Telephone/Fax	800 number
2024-03-05	BOA CC 7572	99.00	Goldman Fund Expenses	Grantstation
2024-03-05	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238.06	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4 -March 2024
2024-03-07	Sowers, Brandon	2482.66	Goldman Fund Expenses	reimbursement for TAKE
2024-03-11	Miller, Lee	223.51	Educ. Media Fund Expenses	for scanner
2024-03-14	ENDICIA	19.99	Catalog Service Postage	monthly charge
2024-03-16	ADP	60.92	Payroll Fees	fees
2024-03-16	Federal & State Payroll Taxes	55.65	Salaries	Employee taxes - Schmidt
2024-03-16	Federal & State Payroll Taxes	55.66	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Schmidt
2024-03-16	Federal & State Payroll Taxes	92.98	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Harris
2024-03-16	Federal & State Payroll Taxes	441.17	Salaries	Employee taxes - Harris
2024-03-16	HARRISWB	774.32	Salaries	Bill - salary
2024-03-16	Schmidt, Amanda	671.85	Salaries	Amanda - hourly pay
2024-03-28	ADP	20.43	Payroll Fees	compensation insurance
2024-03-29	ADP	19.41	Payroll Fees	compensation insurance
2024-03-29	ADP	216.88	Payroll Fees	fees
2024-03-29	Federal & State Payroll Taxes	69.43	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Schmidt
2024-03-29	Federal & State Payroll Taxes	69.43	Salaries	Employee taxes - Schmidt
2024-03-29	Federal & State Payroll Taxes	92.98	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Harris
2024-03-29	Federal & State Payroll Taxes	441.18	Salaries	Employee taxes - Harris
2024-03-29	HARRISWB	774.31	Salaries	Bill - salary
2024-03-29	Schmidt, Amanda	838.07	Salaries	Amanda - hourly pay
2024-03-31	PAYPAL	44.33	Credit Card Expenses	Fees
	- Small Expenditures (3) -	15.44		(Expenditures under \$10 omitted from newsletter)
	- TOTAL -	7999.88		

# April

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2024-04-01	ENDICIA	300.00	Catalog Service Postage	postage for retbutiko
2024-04-05	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238.06	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4 -April 2024
2024-04-08	BOA CC 7572	20.00	Member Mailing Expenses	Mailchimp
2024-04-08	BOA CC 7572	34.99	Bulteno - Fees & Exp.	Adobe Creative Cloud
2024-04-08	BOA CC 7572	40.00	Credit Card Expenses	Payal payment for Payflow
2024-04-08	BOA CC 7572	44.84	Telephone/Fax	800 number
2024-04-08	BOA CC 7572	199.00	Office Expenses	QODBC for one year- used to get access to Quickbooks database
2024-04-08	BOA CC 7572	394.83	Internet Access	Dreamhost annual charge
2024-04-15	ADP	63.20	Payroll Fees	Fees
2024-04-15	Federal & State Payroll Taxes	92.98	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Harris
2024-04-15	Federal & State Payroll Taxes	114.17	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Schmidt
2024-04-15	Federal & State Payroll Taxes	114.17	Salaries	Employee taxes - Schmidt
2024-04-15	Federal & State Payroll Taxes	441.18	Salaries	Employee taxes - Harris
2024-04-15	Harris, William B	774.32	Salaries	Bill - salary
2024-04-15	Schmidt, Amanda	1378.33	Salaries	Amanda - hourly pay
2024-04-16	ADP	23.77	Payroll Fees	compensation insurance
2024-04-16	ENDICIA	19.99	Catalog Service Postage	monthly fee
2024-04-19	DEITZ, AUDREY	300.00	Educ. Media Fund Expenses	Replacement computer for Alex Vaughn Miller
2024-04-30	ADP	20.39	Payroll Fees	Compensation insurance
2024-04-30	ADP	63.20	Payroll Fees	Fees
2024-04-30	Federal & State Payroll Taxes	68.85	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Schmidt
2024-04-30	Federal & State Payroll Taxes	68.85	Salaries	Employee taxes - Schmidt
2024-04-30	Federal & State Payroll Taxes	92.98	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Harris
2024-04-30	Federal & State Payroll Taxes	441.18	Salaries	Employee taxes - Harris
2024-04-30	Harris, William B	774.31	Salaries	Bill - salary
2024-04-30	Schmidt, Amanda	831.15	Salaries	Amanda - hourly pay
2024-04-30	PAYPAL	86.65	Credit Card Expenses	Fees
	- Small Expenditures	13.95		(Expenditures under \$10 omitted from newsletter)
	(2) -			
	- TOTAL -	7055.34		

***Atentu!*** Enigmo-solvo por N<sup>o</sup> 2024:1 troviĝas tuj post ĉi tiu paĝo!

# May

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2024-05-01	Mays, Charles	420.00	Goldman Fund Expenses	PER Deposit
2024-05-01	Mays, Charles	1000.00	Goldman Fund Expenses	PER stipend
2024-05-07	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238.06	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4 -May 2024
2024-05-09	BOA CC 7572	10.95	Internet Access	Dreamhost monthly charge
2024-05-09	BOA CC 7572	20.00	Member Mailing Expenses	Mailchimp
2024-05-09	BOA CC 7572	40.00	Credit Card Fees	Payal payment for Payflow
2024-05-09	BOA CC 7572	44.84	Telephone/Fax	800 number
2024-05-09	BOA CC 7572	52.70	Software	Adobe software
2024-05-09	BOA CC 7572	56.10	Office Expenses	Bloom workspaces - Sacramento mailbox
2024-05-09	BOA CC 7572	109.00	Software	Tech Soup- training materials
2024-05-09	BOA CC 7572	293.33	Usona Esperantisto costs: Bulteno - Print & Post	Bulletin #1 (international postage)
2024-05-09	BOA CC 7572	850.00	Internet Access	Website archive download (later refunded)
2024-05-09	BOA CC 7572	2601.00	Usona Esperantisto costs: Bulteno - Print & Post	Bulletin #1 (printing total + domestic postage)
2024-05-10	ADP	63.20	Payroll Fees	Fees
2024-05-14	ADP	19.66	Payroll Fees	compensation insurance
2024-05-14	ENDICIA	19.99	Cost of Goods Sold:Catalog Service Postage	monthly charge
2024-05-15	Federal & State Payroll Taxes	59.10	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Schmidt
2024-05-15	Federal & State Payroll Taxes	59.10	Salaries	Employee taxes - Schmidt
2024-05-15	Federal & State Payroll Taxes	92.98	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Harris
2024-05-15	Federal & State Payroll Taxes	441.17	Salaries	Employee taxes - Harris
2024-05-15	Harris, William B	774.32	Salaries	Bill - salary
2024-05-15	Schmidt, Amanda	713.40	Salaries	Amanda - hourly pay
2024-05-24	ADP	63.20	Payroll Fees	Fees
2024-05-30	ADP	31.37	Payroll Fees	payroll compensation
2024-05-31	Federal & State Payroll Taxes	92.98	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Harris
2024-05-31	Federal & State Payroll Taxes	104.42	Payroll Tax Expense	Employer taxes - Schmidt
2024-05-31	Federal & State Payroll Taxes	441.18	Salaries	Employee taxes - Harris
2024-05-31	Federal & State Payroll Taxes	104.43	Salaries	Employee taxes - Schmidt
2024-05-31	Harris, William B	774.31	Salaries	Bill - salary
2024-05-31	Schmidt, Amanda	1260.57	Salaries	Amanda - hourly pay
2024-05-31	PAYPAL	83.49	Credit Card Fees (subaccount?)	Fees
	- Small Expenditures (2) -	13.95		(Expenditures under \$10 omitted from newsletter)
	- TOTAL -	10948.80		

# Solvo - Skota skadrono el № 2024:1

enigmo-solvoj

Jen la ĝusta solvo de la krucvortenigmo en № 2024:1, *Skota skadrono*. Ĉi-foje la redakcio ricevis nur unu kompletan kaj ĝustan solvon, de Rafa NOGUERAS – dankon kaj laŭrojn al li!


Ni demandis, ĉu plaĉas la pli granda formato (21×21). La respondoj al ni indikis, ke ĝi estas troa, do *Usona Esperantisto* revenos al malpli grandaj enigmoj – “*kvalito super kvanto!*”

La redakcio akceptas solvojn al [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org), ĉu kiel fotografiaĵon aŭ kiel ekrankopiaĵon. Alternative, kiam enigmo haveblas ĉe alia retejo, la redakcio povas preni la retajn solvojn de tie.

S	A	G	A	C		E	K	M	A	L	A	M	I		S	O	K	L											
P	L	A	C	E	B		K	V	A	R	O	N	A	N		K	A	L	V	A									
E	K	R	E	L	O		H	A	L	I	F	A	K	S		A	Ŭ	D	A	C									
S	O	B	R	A	N		O	R	L	O		T	R	I	K	T	R	A	K	O									
							J	O	H	N	D	I	N	W	O	O	D	I	E										
T	E	E	J		B	A	T	E	G		E	M	O		E	D	W	I	N										
E	K	B	O	L		M	O	K		P	L	I		G	O	R	I	L	O	J									
M	A	L	H	A	V	A	S		E	L	L	E	V	I		O	L	I	V	A									
A	M	A	N	T	I	N		B	R	O	S		E	T	E		L	A	I	K									
							I	N	F	R	A		V	E	P	R		P	L	A	N	L	I	N	G	V			
							R	O	N	K	E	T	I		A	N	A	R	K	I	A								
D	E	M	A	N	D	A	R	O		P	R	E	D		A	R	M	I	T										
I	L	I	N		O	R	K		M	I	A	Ŭ		A	V	I	A	D	I	L									
S	P	E	C	E		M	E	R	I	N	O		E	V	A	K	U	I	T	A									
M	E	N	I	S	K	O		E	L	D		K	L	E		E	L	L	A	S									
							L	U	S	T	R		S	K	I		A	L	I	R	A								
							R	E	T	O	R	O	S	S	E	T	T	I	O										
S	A	M	N	I	V	E	L	E		K	A	R	I		K	R	A	M	P	F									
U	N	U	I	Ĝ		D	I	S	F	O	S	I	S		I	D	E	A	R	O									
D	A	R	F	I		A	S	K	E	T	I	S	M		D	O	R	N	O	J									
A	R	D	O			S	T	I	R	A	N	T	O		S	O	I	F	O										

## Gaja

senintenca esperantaĵo • Alena ADLER



... faras onin la vino.

# Krucvortenigmoj

Ĉi tiu numero havas por vi *tri* apartajn krucvortenigmojn danke al Kartero WILLIAMS! Ilin vi povas solvi aŭ tradicimaniere, aŭ enrete ĉe *Amuse Labs* (vidu malsupre).

Inter la solvintoj po ĉiu enigmo ni lotumos rabaton je 5 \$ de la libroservo. Tio signifas, ke se vi ĝuste solvos ĉiujn tri enigmojn, vi havos trioblan ŝancon gajni!

Ĉiuj membroj rajtas partopreni. Solvoj devas esti submetita aŭ per *Amuse Labs* aŭ rekte al la redakcio antaŭ

**15 Septembro**. Bonŝancon!

*Se vi preferus solvi enrete...*

**“1905”**



<mallonge.net/1905>

**“Laŭdu la tagon nur vespere”**



<mallonge.net/nur\_vespere>

**“Okazas”**



<mallonge.net/okazas>

## Horizontale

1. Pozitiva rezult' de serĉo en la tekstaro
5. Sennaciul'
6. Kvalito
9. Ĉefurb' de la provinco *Drenthe* en Nederlando
10. Filmart'
11. Hazardo estas malbona \_\_\_\_\_o
12. Al kokino la \_\_\_\_\_ lecionon ne donu
13. Forigi nedeziratajn partojn
15. La dekkvina tag', kiel ekzemple de Marto
16. Ŝipan'
17. Mebl' sur kiu oni dormas
18. Apartenanta al eksfraŭlo
19. Bestoĝardeno
20. Membr' de "ni"
21. Trinkujo


1. Ne \_\_\_\_\_ irante, \_\_\_\_\_ 26-Horizontale
10. Konforme al
11. Fari kiel JoMo
12. Laŭ religia aŭ folkloro tradicio
13. Periodo de 14-Horizontale
14. Periodaĵ', ruse aŭ sinuse
16. Ŝtelema korved' kun nigra kaj blanka plumaro
19. Malgranda grup'
22. Laŭ aparta konceptado de la mondo
25. Tiu hom', kiu plenumas la planojn
26. Ne 1-Horizontale irante, 1-Horizontale \_\_\_\_\_

1. Eĉ kiu plej bone pafas, tamen \_\_\_\_\_ maltrafas
4. Post
8. Kroma 18-Horizontale
10. Plant' kiu inspiris la inventon de *Velcro*
11. Ok miliard'
12. Markez'
14. Porteble potencigita
15. Manĝegas
17. Mezurunu' mallongigita per citilo
18. Finaĵo
20. Akcepti en sin, kiel ekzemple enmigrantojn en kulturon
21. Inter pokalo kaj \_\_\_\_\_oj povas multe okazi




## Vertikale

1. Hamleto
2. Returna mansvingo
3. Malrevers'
4. Antaŭparol', Gramatik', Ekzercar', kaj Unviersala Vortar'
6. \_\_\_\_\_ pli da naturkatastrofoj pro tutmonda varmiĝo
7. Homo kiu ĝuas la bazajn politikajn rajtojn de ŝtato
8. Frakcio
14. Uzanta komunikilon kutime trovitan en aŭtoj
15. Nom' de la edzino de la fiŝkaptisto en rakonto de la Fratoj Grimm




“1905”

1. Arb' kies ligno bone bruliĝas
2. Havig' al si
3. Skribi memorigilon
4. Felikso al Lazaro
5. Ekscitiĝa hormon'
6. Fiskita voj', fere
7. Vivten'
8. Esti sen kaŝoj, kiel novnaskito
9. Eŭropo, politike
15. Medikamenta
16. Edzin' de Deŭkaliono, kiu kune travivis la inundegon
17. Koncepte
18. Gepatr' de gepatroj
20. Eksterordinare intensan
21. Klak' de glasoj
23. Bruligaĵ', por lampoj
24. Malege



“Laŭdu la tagon  
nur vespere”

1. Subita kriza malsaniĝ'
2. Gren', el kiu oni lastatempe faras laktaĵon aparte por lakta kafo
3. Brilkolora bird' kun longa beko, manĝanta abelojn
4. Ĉi-tiea, laŭ la aganto
5. Se mi troviĝus en tiu pozicio, mi \_\_\_\_\_ ke mi farus pli bone
6. Laŭleĝa restej'
7. Inspiri, pulme
8. Parolanta lingvon kiel la polan, kroatan, ĉeĥan, aŭ la ukrainan
9. Sekiĝinta lago, sur kies eksa insulo Sovetunio testis armiligitan variolon
13. Kling' kiu troviĝas en necesejo
16. Maldiferenci
19. Model'



“Okazas”

# Kobalto-60: Helpema kaj minaca

scienco • Timothy BORONCZYK

Eventuale helpaj difinoj, adaptitaj el ReVo kaj PIV –

**izotopo:** atomo de ĥemia elemento, diferencanta de alia atomo sam-elementa per sia maso.

**fotono:** kvantumo de elektromagneta radiado; senŝarga elementa partiklo kun nula maso.

**histo:** en organismo, tuto de la ĉeloj, havantaj unu saman funkcion kaj saman formon.

Dum mi interparolis kun aliaj esperantistoj ĉe lastatempa renkontiĝo en publika kafejo, mi aŭdis la konversacion de apuda ne-esperantista grupo. Ili estis universitataj studentoj, diskutantaj pri fiziko kaj radiado. Oportuno amikiĝi instigis min interrompi ilin, dirante (en la angla): “Pardonu la interrompon — mi ne intence kaŝaŭskultis — sed kobalto-60 estas mia plej ŝatata.” Unu studento maltrankvile rigardis min.

Studento: “Kiel vi scias pri tio?”

Mi: “Nu... ĝi estas sufiĉe konata temo, ĉu?”

Studento: “Ne... ne estas.”

Esperantistoj: “Kio estas kobalto-60?”

Anstataŭ komenci amikan interŝanĝon, en kiu ili eble demandos nin pri nia lingvo, mi senintence kreis impreson, ke ni estas grupo de esperantaj teroristoj! Por elturni ion bonan el mia socia mispaŝo, mi decidis, ke la temo taŭgas por artikolo en nia bulteno. Do...



Kobalta blua pigmento; foto de *Wikipedia*.

## Superrigardo

Kobalto estas brila, griza metalo kun multaj uzoj. Ĝi estas uzata en la fabrikado de reŝargeblaj piloj, fortaj magnetoj, veturilaj aerkusenoj, kaj jetmotoroj. Ĝi estas uzata ankaŭ en vitro, pigmentoj, kaj tinkturoj, kreante brile bluan koloron. Komprenoble, mi parolas pri la stabila **izotopo**, kobalto-59, kiu enhavas 27 protonojn kaj 32 neŭtronojn. Aldonante unu plian neŭtrono oni produktas kobalton-60, ekstreme radioaktivan izotopon. Tiu ĉi ne nature aperas kaj plejparte estas produktata en nukleaj reaktoroj.

En la nukleo de atomo de kobalto-60, la plia neŭtrono ŝanĝiĝas al protono, kaj dum tiu procezo, ĝi eligas alt-energian elektronon aŭ pozitronon. Oni nomas tion *beta-radiado*. Poste, la nukleo troviĝas en ekscitita stato kun superflua energio. Por atingi pli stabilan staton, ĝi eligas la ekstran energion en formo de alt-energiaj **fotonoj**, kiun oni nomas *gama-radiado*. Beta-radiado havas malpli da penetropovo, penetrante nur kelkajn decimetrojn da aero, ĉar tiaj partikloj estas relative malpezaj kaj malpli energi-riĉaj ol gama-radioj. Kontraŭe, gama-radiado havas tre altan penetropovon, kapabla trapasi plurajn centimetrojn da plumbo aŭ plurajn metrojn da betono, ĉar ĝi konsistas el elektromagnetaj ondoj, similaj al iksradioj, sed kun multe pli alta energio.

Kobalto-60 ludas gravan rolon en radioterapio por kancero. Aparatoj por radioterapio uzas tiun izotopon kiel fonton de gama-radiado, kiu celas precize detruon de kancerĉeloj. Tiu precizeco helpas redukti la riskon de damaĝo al ĉirkaŭaj **histoj**, speciale dum traktado de tumoroj situantaj en, aŭ proksime de, vitalaj organoj. Kompare kun aliaj radiadfontoj, kobalto-60 ebligas pli fokusajn kaj intensajn radiadon, kiu pli efike traktas certajn specojn de kancero, inkluzive de cerbaj, mamaj, kaj cervikaj kancerroj. Plie, la teĥnologio ofte estas pli alirebla kaj malpli kosta ol pli progresintaj aparatoj, precipe en malpli riĉaj landoj.

Krom la traktado de kancero, la radioaktiveco de kobalto-60 estas facile detektable kaj mezurebla, kio faras la izotopon utila spurilo kaj bildiga rimedo. Ĝi krome estas valora en steriligaj procedoj, kie ĝi estas uzata por radii medicinajn ilojn kaj provizojn por detruigi bakteriojn, virusojn, kaj aliajn patogenojn. Steriligado per kobalto-60 havas kelkajn avantaĝojn kompare al tradiciaj metodoj, kiel vaporo aŭ ĥemiaĵoj, ĉar ĝi povas penetri tra pakaĵoj, efike steriligante grandajn kvantojn da ekipaĵoj. Ankaŭ, ĝi ne postlasas reziduojn kaj ne bezonas altajn temperaturojn, kio faras ĝin favora por diversaj materialoj.



Ujo de kobalto-60; foto de *Los Alamos National Lab.*

## Danĝero! Delasu kaj forkuru

Kvankam kobalto-60 estas utila, malĝusta manipulado prezentas ekstreman danĝeron. Vi eble vidis foton de ujo por kobalto-60 kun la averto 'delasu kaj forkuru', ĉar neŝirmita ekspono al nur kelkaj gramoj de ĉi tiu materialo dum kvin minutoj povas liveri mortigan radiad-dozon.

En la jaro 2000, grava radiologia akcidento okazis en Samut Prakan, Tajlando. Du kolektistoj de metalrubo akiris keston, nesciante, ke ĝi enhavas la radiadfonton de radioterapia maŝino. Ili, kune kun du aliuloj, provis dispecigi ĝin, sed nur sukcesis fendi ĝin. Ili portis ĝin al rubejo, kie malfermante ĝin aperis du malgrandaj cilindroj enhavantaj kobalton-60. Sekvante la elmetigon al la radiado, la kolektistoj komencis sperti kapdoloron, naŭzon kaj vomadon. Dum la sekvaj semajnoj, pli severaj simptomoj manifestiĝis, inkluzive brulvundoj, ŝvelintaj manoj, lakso, febro kaj harperdo.

Kiel rezulto de tiu incidento, dek homoj, inkluzive de la kolektistoj, laboristoj de la rubejo, kaj la familianoj de la rubejestro, estis enhospitaligitaj pro radiada malsano. Bedaŭrinde, tri el tiuj personoj mortis pro siaj malsankondiĉoj. Plue, 1872 homoj en proksimo de la rubejo povis esti elmetitaj al la radiado, kaj proksimume duono el ili petis medicinan atenton. La okazaĵo emfazas la gravecon de prudenta manipulado de radioaktivaj materialoj kaj rapidaj medicinaj intervenoj en tiaj situacioj.

## Konkludo

Sendube, mia provo amikiĝi povus esti pli subtila ol altrudi diskuton pri nuklea fiziko. Mi supozas, ke volonte malkaŝi scion pri speciala teĥnologio povas esti surpriza sen taŭga enkonduko. Tamen, kobalto-60 ja ludas signifan rolon en la medicino kaj industrio, kaj ilustras nian kompleksan interrilaton kun radiado. Espereble, tiu scio nun estas iom pli ĝenerale konata.

# Hundo kiu parolas

facila teksto • Lee MILLER

Post freŝa neĝfalo, Hanna kaj Johano ludis en la malgranda arbaro malantaŭ sia domo.

Subite, ili renkontis grandan, brunan hundon, kiu same ludis en la neĝo.

“Saluton”, diris la hundo.

Post ŝokita paŭzo, Hanna balbutis, “Sed... sed... hundoj ne kapablas paroli!”

“Kaj plenkreskuloj ne kapablas kredi la raportojn de siaj infanoj”, respondis la hundo. “Sed dum la resto de via vivo vi havos belan memoron de nia interparolo!”

Kaj ĝi saltis en la aeron pro ĝojo kaj forkuris en la blankan distancon.

# Biciklo en Aŭtujo

rakonte • Logan HALL

**Aŭtoj estas unu** rimarkenda ero de la usona libereco. Dek ses (16) estas grava aĝo, ĉar tiam oni rajtas akiri stirpermesilon (en plej da gubernioj). Alia grava estas 25, ĉar tiam asekuristoj taksas onin pli matura kaj mallevas la kotizojn; pro la sama kialo, lui aŭton kostas malpli depost 25 jaroj. Usonanoj komprenas, ke ĉiuj ĉi etapoj kreskigas la liberecon – stirpermeso ebligas al adoleskanto viziti la amikojn kaj esplori la urbon, kaj lui aŭton ebligas al plenkreskulo fari la saman en fremdaj, tre foraj urboj.



Inter usonanoj mi ne estas escepto – ankaŭ mi amas aŭtojn. La mia estas ruĝa kabrioletto *MINI* kun turbokompresoro. Mia speciala “truko” estas malfermi la tegmenton, kaj starigi meblojn de *IKEA* en la malantaŭaj seĝoj por 40-minuta veturo hejmen – ne necesas kamiono! Mi tiel ŝatas ĝin, ke mi eĉ havas kroĉetaĵon. Tamen la elekto estis devigita al mi, samkiel al ĉiu alia; mi rajtis elekti mian aŭton, sed ĝi aŭto devis esti. Aŭtoj tiel enradikiĝis en usona kulturo, ke multaj kredas misciton de iama prezidanto de General Motors, “*Kio estas bona por GM, tio estas bona por Usono.*”

Tio pezas en la konscio de multaj usonanoj, inkluzive de mi, kiuj maltrankvilas pro la efiko de brulaĵoj al la medio, kaj kiuj scias, ke veturado ne devas esti tiel fiefika – nur demandu la nederlandanojn pri biciklado, aŭ la japanojn pri tramreloj. “*Estu la ŝanĝo, kiun vi volas vidi en la mondo,*” diris Mahatmo Gandho, sed sen bezonata infrastrukturo, ĉi-okaze ne eblas! Aŭtoj estas ne nia libereco, sed niaj katenoj.

**Almenaŭ tion mi** argumentis al kara esperantisto el Sirakuso, Zerbie HYNSON. Ŝi biciklas ĉiutage al la laborejo; kial mi ne? Nu, kvankam mi laboras ĉefe de hejme nun, mia oficejo estas 20 mejlojn for laŭ aŭtoŝoseo, en alia ŝtato. Okej, sed kio pri aliaj destinejoj? “*Ĉio estas almenaŭ dek minutojn per aŭto,*” asertis mi.

Pri tiu komento ŝi defiis min; tio ne povas esti ĝusta, ĉu? Okej – estas benzinstacio, kelkaj restoraciaĉoj, apoteko, frizejo, kaj la superbazaro. Tuj poste estas la ŝoseo, sur kiu mi ne povas bicikli. Nu, okej, estas ponto trans ĝi, per kiu mi teorie povus atingi la bibliotekon kaj la poŝtejon. Kaj de tie, mi povus plu rajdi al la kinejo. Kaj tio estas jam duono de la distanco al mia patrino...

Plurajn monatojn mi meditis pri tio, ĝis la fino de Aprilo, kiam mi devis redoni kelkajn librojn al la biblioteko. Mi revis fari tion per biciklo. Trafiko inter la hejmo kaj ĝi estas malmulta. Estas spaco por restigi biciklon, do mi povus ripozi tie kaj preni novajn librojn. Ĝi eĉ havas kafejon ene de ĝi, kie mi povus refreŝiĝi.



**Alia konsidero estis** mia sano. Je mia plej granda, mi pezis 290 funtojn (130 kg), starante 5’10” (180 cm). Mi ne estis semajnon de morto, nek monaton, eĉ ne jaron – sed ajna rimedo por plibonigi mian fizikan staton estus bonvena. Tio jam konvinkis min almenaŭ provi; la 1-an de Majo, mi tuj iris al la loka biciklejo por esplori diversajn ekzemplerojn. Mi rajdis unu mejlon, post kiu mi devis ripozi por tagmanĝo kaj akvo – kaj mi subite sentis min kolapsonta. En la plej proksima restoracio, mi tuj kuŝigis mian kapon sur tablon kaj taksis min kvin minutojn de voko por ambulanco. Tio nur konstatis min – temas ne nur pri pezo, sed pri ĝenerala sano; mi *nepre* devas bicikli, aŭ mi eĉ ne ŝtuparon povos uzi post dek jaroj.

Post tagmanĝo, mi revenis por provi kelkajn biciklojn plu ĝis mi elektis unu tre komfortan kaj sufiĉe malmultekostan. Aĉetis mi ankaŭ kaskon, ŝlosilon, kradon por fiksi portaĵojn, kaj lampetojn por ebligi noktan veturadon – mi volis kuraĝon iri ien ajn, iam ajn, kun io ajn. Tre fierigas min la rezulto, kiun mi nomis *Bogue* (laŭ la antikva usona aviadilŝipo, kies nomo signifas “torento”, kvankam la vorto signifas ankaŭ “vagi”).



Subite, nova mondo malfermiĝis al mi. La lokajn “restoraciaĉojn” mi mistaksis; la malplej bonaj, kiujn mi konis de infanaĝo, antaŭ longe malaperis – kaj nun estas nova trinkejo kun bongusta tapioko-teo, afablaj servistinoj, kaj *Wi-Fi*. Grandan parton de ĉi tiu artikolo verkis mi ĉe tiu trinkejo, atingita per biciklo! Kaj post nur ses tagoj, mi jam sukcesis iri al la biblioteko (kaj redoni miajn librojn), 4,5 mi (7 km) de mia domo. Tio estas multa progreso de la sola mejlo, kiu preskaŭ mortigis min antaŭ semajno!

Restas multa alkitimiĝado tamen. Je alia okazo, mi biciklis dum tago iom tro varma kun iom tro malpli da akvo. Decidante, ke mi rajdi ne plu povas, mi kondukis min al la trotuaro kaj kuŝis en apuda gazono. Post nur minuto, aŭtanta haltis por kontroli, ĉu mi estas en ordo, kaj proponis veturigi min hejmen – ŝi eĉ havis botelon da akvo! Mi tre dankas la sorton, ke mia komunumo estas tiel afabla. Eble loĝi en Aŭtujo havas siajn avantaĝojn.

Ĉiuokaze, bicikli estas defio, kiun mi ĝojas surpreni por miaj sano kaj forto. **Mi same defias al vi:** Kien povas biciklo porti vin?

## La vivo de Peĉjo

ĉercoj • Timothy BORONCZYK



# Kroniko de eklipsoj

La 8-an de Aprilo, 2024, plena suneklippo strekis tra Nord-Ameriko – momento observita de multaj membroj de E-USA kaj konsistiganta la temon de ĉi tiu numero de *Usona Esperantisto*. Fakte, eklipsoj estas rakontitaj multfoje en la usona esperantista historio – tial, la redakcio prezentas kelkajn tiujn rakontojn el la arĥivoj en akompano de unu aktuala.

## La eklipso

el la arĥivo • Warren GOULD

En la dua numero de *Amerika Esperantisto* en 1925, Warren GOULD rakontas pri [La eklipso](#), “la plej granda spektaklo” de sia vivo, okazinta la 24-an de Januaro, 1925.

Kvankam la eklipso je 24a januaro, 1925, ne estis tute kion mi antaŭesperis, malgraŭe mi konsideras ĝin la plej granda spektaklo de mia vivo.

Du minutoj antaŭ totaleco la malheleco suben venadis tavolo, kvazaŭ virego tiradis kurtenojn unu post la alia antaŭ tre brila lumilo.

La neĝo viviĝis kaj ekstremis.

La lumo ŝajnis unue nur paliĝi. Poste ĝi ŝanĝis pli blua, kaj eĉ tre funta bluo kun lasta ekbrilo da verdo antaŭ la mallumo.

Alta nubo en la okcidento paliĝis, malpligrandiĝis, ekmovis kontraŭ la venanta ombro de la luno, alten, suden, kaj malantaŭen.

Momenton sekvantan la mallumo de la luna orbo atingis nin; la steloj ekaperis; anstataŭ la suno estas ŝajne malgranda nigra truo, multe pli malgranda ol la suno kiu estis kaŝita. Ĉirkaŭ la nigra luno estis la krono tiel brila kiel plenronda luno.

Post unu momento la suno ekbrilis preter la nigra luna rando, kaj la plej granda vidindaĵo de la centjaro estis finiĝinta.

## Ĉu vi kongresis hungarie?

el la arĥivo • Miko SLOPER

Kvankam ne sur Usono, Miko SLOPER skribis en 1999 pri momento, kiam la tiujara Internacia Junulara Kongreso en Hungarujo estis regalita de eklipso.

Ĉi tiu citaĵo estas nur eta parto de funda artikolo el [EsperantoUSA № 1999:5](#), *Ĉu vi UKis berline... aŭ ĉu vi kongresis hungarie?*

Inter la plej allogaj eventoj dum la kongreso havis nenian rilaton kun Esperanto: temas pri la plena eklipso, kiu perfekte videblis de la kongresejo. Magie malaperis la lumo kaj falis la temperaturo. Nenia antaŭpreparado povas vere prepari onin por propra-okula vidaĵo de tia enĉiela korono. Ni ĉiuj preĝis ke revenu la suno, kaj danke al la gedioj, ĝi ja revenis. Mirinda spektaklo!



Fotis Vinĉjo ALLISON ĉe Marysville, Ohio (2024)

# La suneklipso de 2017

el la arĥivo • Walter MURAWSKI

Usonon trafis alia plena eklipso antaŭ relative mallonga tempo, la 21-an de Aŭgusto, 2017. Walter MURAWSKI dividas sian sperton en tiama artikolo, [La suneklipso de 2017](#).

Multaj usonanoj ĝuis oportunon sperti la plenan suneklipson, kiu okazis la 21-an de Aŭgusto, 2017. Sed tiu eklipso estis plena (Sunu estis tute kaŝita de Luno) nur por observantoj ene de maldika “strio de pleneco”. Tiu strio trapasis la tutan kontinentan parton de Usono de Portlando en Oregono ĝis Ĉarlstono en Suda Karolino. Homoj ekster la strio spertis nur partan eklipson.

Miaj edzino, filo kaj mi spertis la fenomenon en la malgranda urbo Easley en Suda Karolino, ĉirkaŭ 250 kilometrojn de nia hejmo. Mia filo Tomas fotis la eklipson. En la komenco, kiam Luno komencis kovri Sunon, la ĉielo estis klara kaj preskaŭ sennuba. Iomete pli ol unu horo poste, Suno estis plene kovrita.

Ĉirkaŭ 20 minutojn post la ekkovro, venis nuboj kiuj tute kaŝis la spektatan fenomenon. Ni ekpensis, ke ĉio estas perdita: la penoj de la vojaĝo, la antaŭa preparado, ktp. Sed feliĉe, la nuboj foriris post 15 minutoj kaj la ĉielo estis denove klara. Ni senĝene vidis la plenan stadion de la eklipso.

Pleneco, la tempo kiam Suno estis tute kovrita, daŭris iomete pli ol du minutojn. Dum tiu tempo la ĉielo kaj la ĉirkaŭaĵo mallumiĝis. Ni sentis la temperaturon malaltiĝi. Estis sufiĉe mallume por vidi la planedon Venuso ĉe la okcidenta flanko de la kovrita Suno. Kolego diris al mi, ke li vidis ankaŭ Merkuron.

La eklipso estis vere vidinda fenomeno. Venonta eklipso estos videbla en Usono en la jaro 2024. Ni certe atentos ĝin.

Plena stadio  
de la suneklipso.  
Fotis Tomas MURAWSKI.



# Enĉeliĝo en la ĉielo


en la ĉielo • Enrique HARO



Mi legis artikolon pri spektinto de pleneklipso okazinta en Meksiko en 1990, kiu ankoraŭ havas la saman eklipsospektilon, kiun li uzis tiam, kaj li volas uzi ĝin denove ĉi-eklipse. Miaj gepatroj spektis tiun unuan eklipson, kaj ekde mia naskiĝo, ili ĉiam rakontis al mi pri la beleco kaj sentoj, kiuj formiĝas dum evento tia. Ĉio haltas, ĉiuj silentiĝas. Kiam la sombro, kiun la luno kreas, malrapide moviĝadas sur la teron, homoj el malsamaj urboj, malsamaj gubernioj, kaj eĉ malsamaj landoj laŭvice ekmiras pri la nekutima dua punkto okazanta en unu tago. Kompreneble, kiam mi eksciis pri la pleneklipso, kiu estis okazonta ĝuste sur mia urbo, mi sciis, ke ĝi estos nemaltrafebla sperto.

Oni diras, ke estas preskaŭ neeble priskribi eklipson, des malpli eble pleneklipson. Provi priskribi tion, kion pensis la spektantoj de ĉi tiu kosma danco, estus stulte. Emocioj kaj pensoj ne estas la samaj por ĉiu ĉeestanto, ĉu nostalgio pri pasintaj eklipsoj, ĉu scienca scivolemo, ĉu eĉ kapdoloro pro sunrigardado sen eklipsospektilo! Mi provu do priskribi la haoson kaj etoson, kiu ekformiĝis antaŭ la sunkovriĝo en la teksasa ĉefurbo.

La vetero ŝajnis netaŭga. Kvankam rapide, nubegoj movis sin tra la ĉielo kovrante kaj la kutime bruligan sunon, kaj la modestan lunon. Meteorologoj ne certis, ĉu pluvos, aŭ ĉu ni povos spekti la eklipson. Familia amiko venis el najbara urbo por sperti la plenecon de eklipso, ne okazonta en lia urbo. Estas li, kiun plej multe panikis la nuba tuko kovranta nin tiam, pro tio, ke li alportis specialan fotilon, kaj eĉ teleskopon.



Restis nur kelkaj minutoj ĝis la ringa lumkoncerto. Ni stiris en parkon, pretigis la alportitajn aparatojn por la evento, kaj esperis pli bonan veteron. Kvankam multaj nuboj ankoraŭ ripozis supre, truoj ekaperis en ties vaporaj haŭtoj. Homoj kriis ĝoje! La suno estis jam pli ol naŭdek elcente kovrita, sed oni bezonas plene kovritan astron por sperti la malhelon kaj malvarmeton, kiuj akompanas nokton, eĉ se nur minutdaŭran.

Finfine alvenis la multe atenditan momenton: kovriĝo. Kvazaŭ mondfina filmo, la ĉielo nigriĝis; ĉeestantoj, antaŭe laŭtaj, subite kvietiĝis; kaj birdoj komencis krii kaj forflugi. La kutime blindiga suno enĉeliĝis, lasante nur fajroringon. Homoj nun povis rigardi ĝin senprotekte dum ili ridis kaj brakumis unu la alian. Ĉiuj haste fotis kaj sin kaj nian plej proksiman stelon, lasante kiom eble plej da tempo por miri. Ni aŭdis la ho-kriojn de apudaj infanoj; certe temis pri ties unua eklipso, malkiel kelkaj homoj el nia grupo. En 2045, kiam okazos la sekva pleneklipso en Usono, eble tiuj infanoj sentos la saman nostalgion pri ĉi tiu eklipso, kiun ni sentas pri pasintaj.

Bedaŭrinde tamen, tiel rapide kiel ĝi komenciĝis, la pleneklipso finiĝis. Ĝi daŭris iom pli ol du minutojn, sed la impresoj, kiun ĝi kaŭzis en la monda spektantaro, certe daŭros pli ol tio. Kvazaŭ montrante novan tagon, krepuskecaj lumradioj anoncis la finon de la spektaklo. Vivo daŭru. Homoj eniris konstruaĵojn, aŭtoj komencis hupi denove, kaj ni enpoŝigis niajn telefonojn.

Multaj homoj tuj ĵetis rubujen siajn eklipsospektilojn. En 2045, por la venonta eklipso, eble niaj poŝtelefonoj ebligis al ni ĉeesti eklipsojn okazantajn aliloke kaj alitempe. Eble scienco progresos tiom multe dum la venontaj dudek jaroj, ke oni ne bezonos tiajn spektilojn. Sed por la okazo, ke poŝtelefonoj ne ebligis tion al ni, kaj ke scienco ne progresos tiom multe... Samkiel tiu spektinto de la eklipso en 1990, mi ankoraŭ havos miajn humilajn kaj fidindajn eklipsospektilojn, uzitajn la 8-an de Aprilo, 2024.





# The Language Corner with Lee Miller

## About the suffix *-ist-* and the words for people in occupations and professions

Let's take a look at the three main categories of such words:

### 1. Words that name the people who do a certain kind of work. For example:

pastro = pastor  
advokato = lawyer  
arkitekto = architect  
biologo = biologist  
kirurgo = surgeon  
konduktoro = conductor  
profesoro = professor  
reĝo = king  
aŭtoro = author  
studento = student

For these words, the suffix *-ist-* isn't used. It creates a redundant form. *Biolog/ist/o*, for instance, would mean "a biologist-ist". *Kirurg/ist/o* would mean "a surgeon-ist". And those simply aren't concepts that people use.

### 2. Words that are formed from roots that name something other than the people who do the work or activity, using *-ist-*. For example:

instrui – instruisto = teacher  
esplori – esploristo = researcher, explorer  
baki – bakisto = baker  
biciklo – biciklisto = bicyclist  
poŝto – poŝtisto = postal worker  
verki – verkisto = writer  
juĝi – juĝisto = judge  
kultivi la teron – terkultivisto = farmer

### 3. Words formed using the participle *-ant-* or *-int-*. For example:

lerni – lernanto = pupil  
helpi – helpanto = helper  
krei – kreinto = creator

**Note that sometimes two or more different forms are used.** For example:

traduki – tradukisto = a (professional) translator  
traduki – tradukanto = a person translating something  
traduki – tradukinto = a person who translated something

---

## Kolofono

*Usona Esperantisto* estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 200–1600 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retroŝte kun viaj nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitaĵajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redakcio aŭ de Esperanto-USA.

Sendu kontribuojn al [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org).

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redidoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atentu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

La limdato por artikoloj en N<sup>o</sup> 2024:3 estas la **15-a de Septembro**. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon en la bulteno kaj en aliaj eldonaĵoj. Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.

**Redakcia teamo:** Alena ADLER kaj Logan HALL.

# Laste aperigitaj de Vinilkosmo kaj laste premiitaj

muziko

## Armél Amiot - *Dezertoj*

*Dezertoj*, la dua bit-albumo (kaj tria esperantlingva albumeto) de Armél Amiot, de Normandujo en Francujo, publikigis la 24-an de Majo 2024. Post du-jara paŭzo, la artisto esploras solecon kaj forlason per mitoj pri la dezerto. La albumo enhavas ses titolojn kun originalaj muziko kaj teksto, ĉiuj kantoj parigitaj kiel averso kaj verso. Oficialaj muzikvideoj de *Nek viro, nek virino* kaj *Amikeco* haveblas ĉe Jutubo.



[“Nek viro, nek virino” - Armél Amiot \(Oficiala muzikvideo\)](#)<sup>1</sup>

[“Amikeco” - Armél Amiot \(Oficiala muzikvideo\)](#)<sup>2</sup>

La kantotekstoj legeblas per subtitoloj sur la muzikvideo en Esperanto, la angla aŭ la franca. Elektu lingvon per la agordilo.

## Mastrigado de nova unuopaĵo de La Mondanoj — *Rapidu, Vagonaro*

Sep monatojn post la apero de ilia unua unuopaĵo *La Junularo de Hodiaŭ*, La Mondanoj, rok-bando kun homarana mesaĝo formita en Berlino en 1983, finpreparas novan eldonon...



Post longa miksado en Berlino, nun la projekto atingis la mastrigan etapon en la *Studio de la Trappe* fare de Triboulet por la nova unuopaĵo ***Rapidu, Vagonaro***.

Ili origine verkis la kanton en 1984 dum vojaĝo tra Hungarujo per la Pasporta Servo.

La Mondanoj ofte ludis *Rapidu, Vagonaro* en siaj koncertoj. Post la reviviĝo de la bando, la kanto estis registrita profesie por la unua fojo, kun preskaŭ la originalaj kantoteksto kaj aranĝo. La dutitola unuopaĵo

entenos kaj la kantitan version, kaj la instrumentan, por tiuj, kiuj emas kanti laŭ la instrumenta fono... La unuopaĵo *Rapidu, Vagonaro* oficiale aperos la 19-an de Julio 2024.

Atendante la finpreparojn de la bita eldono, jen videoto filmita de Triboulet en la studio dum la mastrigado.

## Martin Wiese - *Ruinoj*

Antaŭĝuu ses novajn kanzonojn en nova bit-albumeto *Ruinoj* de Martin Wiese, aperigita la 25-an de Junio. Ĉiuj originalaj akustikaj pecoj registriĝis kaj miksiĝis en la hejma registrejo de Martin en Svedujo kun mastrigado de Triboulet ĉe *Studio de la Trappe* en Francujo. Jen ŝtelrigardo pri la novaj kanzonoj, melankoliaj melodioj kun profundaj emocioj kaj lerte verkitaj tekstoj kiuj respegulas la etoson de la muziko, spekteblaj en Jutubo.



[Resuma prezento de la nova albumeto de Martin kaj la talpoj](#)<sup>3</sup>

## Laste premiitaj

Gajnis en la 43-a Kantoparado de Verda Stacio...

- unuarange, kun 62 poentoj, [Nia Lingvo Esperanto](#)<sup>4</sup> - Ralph Glomp
- duarange, kun 52 poentoj, [Preĝo de François Villon](#)<sup>5</sup> - Mariusz Domaszewicz
- triarange, kun 50 poentoj, [Kara Anĝel](#)<sup>6</sup> - Kaŝi

[Resuma filmo de la 43-a Kantoparado spekteblas en Jutubo.](#)<sup>7</sup>

La Kantoparado okazas regule, do ne maltrafu estontan okazon voĉdoni por elstaraj esperantlingvaj kantoj. Raportiĝis en Eventa Servo iuj falsaj voĉdonoj de ne-esperantistoj ne sekvantaj la regulojn. Evidente, iuj voĉdonoj tiaj forĵetiĝis, tamen, via voĉdono ja gravas! Kiel indiko de la povo de voĉdonado, memoru ke Kjara estis taksata plej malsupre de la juĝista panelo por la Eŭrovizia Konkurso pri minoritataj lingvoj, sed tamen gajnis la



konkurson kun preskaŭ nekredbla abundo da retaj voĉdonoj, spite al la multe pli grandaj parolantaroj de aliaj konkursantaj lingvoj en la konkurso. Vi povos sekvi novaĵojn pri Kantoparado ĉe Eventa Servo.

[Eŭrovizio por la minoritataj lingvoj 2022 - Venkis la Esperanto-kanto "Mozaiko" de KJARA<sup>8</sup>](#)

<i>Kanto (lingvo)</i>	Poentoj - ĵurio	Poentoj - popolo	Poentoj - sume
<i>Mozaiko (epo)</i>	41	376	<b>417</b>
<i>Midas (glg)</i>	88	16	<b>104</b>
<i>Pols Estel . Lar (cat)</i>	65	17	<b>82</b>
<i>Una Segunda Piel (lad)</i>	69	3	<b>72</b>
<i>Bajimusas (sme)</i>	60	11	<b>71</b>
<i>Illargi Berriak (eus)</i>	56	14	<b>70</b>
<i>Baskhort Tele (bak)</i>	51	18	<b>69</b>
<i>O Generale (cos)</i>	52	15	<b>67</b>
<i>Doenit Als Vir Liefden (afr)</i>	53	10	<b>63</b>
<i>Vallende Sterren (nds)</i>	52	6	<b>58</b>
<i>Schwientek G (wen)</i>	52	4	<b>56</b>
<i>Älskling (sv-FI)</i>	46	5	<b>51</b>

1. <[youtu.be/Zx\\_EbvAH7sw](https://youtu.be/Zx_EbvAH7sw)>
2. <[youtu.be/bRpaeUfMMks](https://youtu.be/bRpaeUfMMks)>
3. <[youtu.be/4YXrCUL7bwA](https://youtu.be/4YXrCUL7bwA)>
4. <[youtu.be/EYUqBk6dnt0](https://youtu.be/EYUqBk6dnt0)>
5. <[youtu.be/JTicvdJRV44](https://youtu.be/JTicvdJRV44)>
6. <[youtu.be/YInoaHmJrAg](https://youtu.be/YInoaHmJrAg)>
7. <[youtu.be/Au5ZnNzKnko](https://youtu.be/Au5ZnNzKnko)>
8. <[youtu.be/xT2hqNbCgRQ&t=25s](https://youtu.be/xT2hqNbCgRQ&t=25s)>

La sekción *Laste premiitaj* aŭtoris Alena ADLER; ĉiuj aliaj estis adaptitaj de la retejo de Vinilkosmo kun permeso. Jen ligiloj por vidi pli:

Retejo: <[vinilkosmo-mp3.com/eo/](https://vinilkosmo-mp3.com/eo/)>  
 Abonklubo: <[frama.link/abonklubo](https://frama.link/abonklubo)>  
 Blogo: <[vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo.html](https://vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo.html)>  
 Elsendfluejo: <[music.divercities.eu/labels/183](https://music.divercities.eu/labels/183)>  
 Ĉe Vikipedio: <[eo.wikipedia.org/wiki/Vinilkosmo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Vinilkosmo)>

## Aŭtoroj (ordigitaj laŭ apero)

### Brandon SOWERS

Brandon Sowers estas la prezidanto de la estraro de Esperanto-USA.

Li esperantistiĝis en 2003 kaj aktivis en pluraj urboj kaj landoj. Li estas parto de la teamo de Usona Persone.


<[brandon.sowers@esperanto-usa.org](mailto:brandon.sowers@esperanto-usa.org)>



### Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel programisto.


<[tboronczyk@gmail.com](mailto:tboronczyk@gmail.com)>



### Lee MILLER

Liĉjo is a member of the Akademio de Esperanto, is an expert Esperanto instructor, and has been the main administrator of the Duolingo Esperanto Learners Facebook group since its inception in 2015. This article is adapted from one of his popular language lessons posted in that group.

<[licxjo@gmail.com](mailto:licxjo@gmail.com)>



### Logan HALL

Loĉjo estas redaktoro de *Usona Esperantisto*, komencinta en 2024. Li estas ankaŭ estro de la Projekta Komitato, kaj mastro de la esperanta novaĵ-elsendo *Resumo Monata*.

<[logan.hall@esperanto-usa.org](mailto:logan.hall@esperanto-usa.org)>



### Debra HAMEL

Debra estas verkisto de pluraj libroj pri antikva Grekujo (en la angla). Ŝi loĝas en Konektikuto, Usono.



Sendu al la redakcio viajn informojn por aperi ĉi tie en numero, al kiu vi kontribuis! Kelkaj aŭtoroj ne submetas biografieton kaj ne aperas tie ĉi.

# Mikronoveloj

Por tiu ĉi rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero! Redaktis la mikronovelojn HOSS FIROOZANIA kaj RAFA NOGUERAS kunlabore kun la redakcio.

## Kun granda potenco...

Debra HAMEL



Ŝi ekbabilas ĝin ĉetrinkeje: “Tio, kion mi diras, realiĝas.”

“Kio?”

“Mi diras ion, kaj tio okazas.”

“Vi ŝercas.”

“Pluvas.”

“Nenia nubo enĉielas,” mi diras kaj ekrigardas tra apuda fenestro: tuj ekstere ekfalas kolono de pluvo kvin metrojn larĝa, malsekigante la pavimon.

“Mi respondecas pri multe da stranga, ege loka vetero. Ankaŭ aliaĵoj.”

“Vi povas –”

“Oni taksu ĝin beno, sed –”

“Pardonpet...,” ebrulo interrompas. Ignorante min, li fiksas la okulojn al ŝi – ŝiaj mamoj, fakte – kaj ekkoketas neefike, findirante, “Ni kunfaru ion. Mi promesas, ke vi ĝuos. Nur diru, kion vi volas fari.”

“Nenio pli plaĉus al mi,” ŝi diras. “Sed estus maljuste.”

## La elekto

Timothy BORONCZYK



Andreo staris sur malnova ponto, tenante arĝentan moneron en la mano. La ponto estis pli ol nur transirejo; tie li renkontis sian amatinon, Melinda. Sed la lazura ĉielo kaj murmuranta rivereto ne harmoniis kun la korŝiraj pensoj batalantaj en lia kapo, kaj la monero ŝajnis pli peza ol ĝi vere estis.

Averse, la neesploritaj landoj kaj aventuro, kiuj alvokis lin. Reverse, geedziĝo kun la amata Melinda, kaj trankvila familia feliĉo. Ĉu la sorto elektos liberecon aŭ amon?

Andreo ĵetis la moneron ĉielen. Ĝi refalis, kaj ...

Li maltrafis ĝin.

Kun mallaŭta *plaŭd'* ĝi malaperis en la akvon. La sorto rifuzis elekti.

# Pigo kaj korvo

CHUN Chung-Ha



Akraj birdoblekoj sonis de malantaŭe. La viro, kiu ĝis tiam ĝuis sian promenadon, ektimis. Super lia kapo flugis korvo, kaj pigo persekutis ĝin. La korvo malsupreniris sur stratlanternon. La pigo eksidis proksime.

“Kial vi atakis min?” demandis la korvo.

“Kial vi venis al mia arbo?” respondis la pigo.

“Por ripozi!” kriis la korvo.

“Vi invadis mian teritorion. Estas nesto en tiu arbo!” kriis la pigo.

“Ho, mi pardonpetas. Mi ne sciis,” moliĝis la korvo.

“Pro nova ido mi fariĝas agresema,” klarigis la pigo.

La viro turniĝis kaj revenis al la stratlanterno. La du birdoj sidis unu apud la alia. Paco!

# Turistoj

Debra HAMEL

La trinkejo kvietas. Nur la kutimaj tagmezaj klientoj sidas ĉebufede: la vilaĝa kuracisto, la garaĝisto, la barbiro. Ŝi sidas ĉetable, sola. Maljuna Joĉjo verŝas bierojn.

La superporda sonorilo tintas kaj Vilĉjo eniras. “Nu, mi havas novaĵojn,” li diras al neniu aparta. Ili rigardas lin. “Turistoj. Mi veturigis paron. Ili vizitos la forlasitan kastelon por vidi nian faman fantominon.”

Joĉjo ridas. “Ĉu fama ŝi estas nun?”

# Progreso

Timothy BORONCZYK



Foto de Jiuguang Wang, CC BY-SA 2.0.

La malnova koncertejo, citadelo de melodioj kaj memoroj, staris ĉe la rando de silento. Ĝiaj muroj, kiuj iam resonis simfoniojn, estis baldaŭ malkonstruotaj, liberigonte spacon por modernaj oficejaj turoj.

La adiaŭa koncerto estis grandioza afero, kulminante kun *Odo al Ĝojo* de Beethoven, majstroverko pri la triumfo de unueco kaj frateco. Kiam ĝia fina kresĉendo plenigis la halon, la aŭskultantoj supozis tion la difine fina momento por la koncertejo.

Horojn poste, en la sekvantan kvieton eniris laboristo, al kiu oni komisiis la finan inspektadon. Murmurkante la vortojn de *T.N.T.* de AC/DC, li senkonscie anstataŭigis la lastajn notojn aŭditajn en la halo.

“Ŝajne,” Vilĉjo diras. “Turistoj.”  
Li petas bieron.

En vilaĝeto, oni devas sin distri. Ŝi surtabligas monon kaj senbrue eltrinkejiĝas. La kastelo foras sep minutojn, kaj la nebulmaŝino kaj viktorina robo jam estas en ŝia aŭto-kofro.



# Memore al Lusi HARMON

La redakcio bedaŭras informi, ke Lusi HARMON forpasis antaŭ kelkaj semajnoj, pace en la nokto. Lusi estis motoro de la movado, kiu servis longe kiel komitatano A por UEA, profesie helpis multajn usonajn esperantistojn sukcese vojaĝi eksterlanden – eĉ al Kubo dum la embarga periodo – kaj eble plej grave, produktis la kurson *Esperanto, la Pasporto al la Tuta Mondo*, trovante ĉiujn kunlaborantojn kaj multe vojaĝante por monkollekti por la multjara filmprojekto. Ne ĉiu sukcesas en sia vivo tiom kontribui al nia movado kaj al la reputacio de usonanoj en Esperantujo. Derek ROFF verkis nekrologon, kaj diversaj homoj, kiuj konis kaj amis ŝin, kontribuis fotojn kaj skribis kelkajn memorojn pri ŝi. Krome, ni republikigas ĉi-numere elĉerpaĵon de intervjuo kun ŝia edzo Bill HARMON, kiu mem forpasis antaŭ kvin jaroj, en kiu li respondis mallonge pri Lusi, kaj artikolon, kiun ŝi verkis por *La Revuo Orienta* en 2010.

---

## Nekrologo de Lusi HARMON

Lusi HARMON was such an important part of ELNA and Esperanto-USA for so many decades, that it would take many pages to describe even a portion of all she did. I first met her, in the 1970s and early 1980s, through the intensive summer Esperanto classes, which we now call NASK. Lusi and her husband Bill always hosted the students and local Esperantists at a garden party during one of the weekends, and this was a memorable part of the learning experience. In their beautiful home, great food, songs, games, and stories helped me get a sense of Esperanto culture beyond the classroom.

A few years later, when I began to travel to Europe for Esperanto gatherings, Lusi helped me, as she helped many others, in her role as an experienced travel agent. Her skills in this area helped many of us save money and avoid problems with our travels.

In the 1990s, Lusi led a team in the creation of the 16-part educational video program, *Pasporto al la Tuta Mondo*. She brought together talented video professionals, magnificent Esperanto actors, some of whom were acting for the first time, and she convinced Paul GUBBINS to create the most extensive theater work in the history of Esperanto. Stefan MACGILL created a series of exercises to go with the videos. The time and energy that Lusi put into realizing this project is astounding. The video was first shot in an analog format, then digital tape, and was finally edited, and rereleased on VHS and DVD. Later, the lessons were made available on YouTube.

In a testament to her vision for this learning program, *Pasporto al la Tuta Mondo* is getting renewed attention, and is being used in new Esperanto classes in Spain. We are working on preparing a new version with higher video resolution and improved audio. The updating of *Pasporto* is a fitting testament to the lifelong contributions that Lusi made to the Esperanto world.

– Derek ROFF

---

(Elĉerpaĵo de intervjuo origine publikigita en *UE* № 2013:5 – [An interview with William R. HARMON](#) by Ĵenja AMIS)

### **Your wife Lucy is a very active Esperantist. How did you meet? Are any other members of your family Esperantists?**

We'd need a whole new article or issue for me to fully answer this about Lusi. She has done a truly amazing thing in producing the 16-lesson video course [...] *Pasporto al la Tuta Mondo*. She found the author, found the cast (all of whom worked without pay), found the perfect director (Judy MONTELL), almost single-handedly raised the sum of over \$300,000 to make filming and production possible. She interlaced the filming with the classes at SFSU [San Francisco State University] to provide a steady stream of extras. She pulled rabbits out of hats constantly. I'm truly proud of her.

How did we meet? We've been married for 43 years now, but I still remember the first time I saw Lusi at a Democratic party after an election in Southern California. We were married shortly thereafter and have been teammates ever since. As to other family members, only my grandson Justin has seriously taken to Esperanto, although I sent several others to Esperanto courses including those at SFSU.

# Panegiroj

Lucy estis speciala persono kaj ni tre sopiras ŝin. La familio esperas havi feston de vivo ie en la golfa regiono de Sanfrancisko, plej verŝajne en Oktobro. Ni ŝatus inkluzivi E-Usonon kaj aliajn amikojn de Lucy kaj Bill. Ajnaj sugestoj kaj ajna helpo estas bonvenaj.

– Justin HARMON

Mi nur bone konatiĝis kun Lusi dum nia loĝado en la golfa regiono kaj la kreado de *Pasporto al la Tuta Mondo*. Ŝi estis ĉiam optimisma, persistema, kreema, gastama kaj sindonema. Vere aminda virino!

– Ellen EDDY

Dum partopreno en frua NASK en Sanfrancisko, Lusi HARMON portis la unuan amuzan T-ĉemizon en Esperanto, kiun mi iam vidis. Se mi ĝuste memoras, ĝi surhavis grandan krokodilon, kun verda stelo pinte de la vosto, kaj la vortojn, “Mi Amas Esperanto”. Kiam mi vidis tion, verŝajne mia vizaĝo montris mian miron pri la manko de akuzativo. Antaŭ ol mi povis diri ion, Lusi rapide turnis sin, kaj montris la dorsan flankon de la ĉemizo. Tie staris grandega ‘-N’. Mi tuj ridis.

– Derek ROFF

Mi unuavice renkontis Lusi dum unu el ŝiaj famaj someraj ĝardenfestoj, kiujn ŝi kaj Vilĉjo organizis dum multaj jaroj, kiam mi estis unuafoja, adoleskanta lernanto ĉe NASK. Ŝia gastamo sentigis min tuj komforta, malgraŭ mia magra rego de la lingvo tiam. La sekvan jaron, ŝi faris multajn klopodojn por gajni la permeson de mia patrino, por ke mi partoprenu en la filmado de *Pasporto al la Tuta Mondo*. Lusi neniam facile venkeblis, kaj ŝi sukcesis akiri min al la teamo. Mi gastis ĉe ŝi kaj Vilĉjo plurfoje dum la filmado, kaj spertis ŝian magian povon fari eĉ la plej nervozan gaston trankvile ĉeĥejma. Dum la jaroj, ŝi bonkore faris al mi multajn elstarajn kaj amikajn konsilojn, kiuj tre helpis min en mia vivo. Aparte mia esperanteco estus tute alia, se ne pro la sindonema gastamo kaj amikeco de Lusi.

– Alena ADLER

---

(Elĉerpaĵo de artikolo origine publikigita en *La Revuo Orienta*, novembro n-ro de 2010)

## Kiel Esperanto ĝojigis mian vivon?

Kiam mi renkontiĝis (kaj amikiĝis) kun mia estonta edzo Vilĉjo en 1960, mi aŭdis la vorton “Esperanto” por la unua fojo. Li eklernis ĝin kiel 13-jaraĝa knabo. Iom hazarde, preskaŭ senprobleme, li lernis kaj ekĝuis la mondon de Esperanto kaj amikajn rilatojn kun pli “larĝmensaj” usonanoj. Kaj pro tio, li fariĝis multe pli interesa al mi.

Sed mi ne facile lernas “fremdajn” lingvojn. Tute honeste, mi ne havas la “orelon” por lerni lingvojn. En lernejo mi ĉiam estis bona lernanto – krom pri lingvoj. Tamen post nia geedziĝo, kiam gastoj vizitis nin, mi ofte frustriĝis, ĉar mi ne komprenis la belajn, lertajn, rid-plenajn konversaciojn! Mi estis tre bonŝanca havi eblecon lerni la lingvon kun la fama, kara poeto, Vilĉjo AULD ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato (nuntempe konata kiel Nord-Amerika Somera Kursaro, okazanta en San Diego, Kalifornio). Ju pli mi lernis kaj amikiĝis kun esperantistoj lokaj kaj internaciaj, des pli mi ĝuis la specialajn eblecojn kiujn Esperanto donis al mi.

Esperanto savis mian menson, kiam Vilĉjo akceptis laboron en Japanio kaj ni decidis transloĝiĝi. Mi devis lasi mian laboron kiel instruisto kaj lerni tute novan kaj malfacilan vivmanieron. Ni ne volis loĝi en la “eksterlandula komunumo” kaj esti konataj kiel “tipe arogantaj” parolantoj de la angla. Sed sen la helpo de la studentino, Humiko Nakano (nun Numata), mi tute ne sukcesus. Kaj ni oftege havis la plezuron gastigi la lokan grupon en nia domo dum niaj jaroj en Japanio.

Por montri la absolutan neceson uzi Esperanton por bone vivi en Japanio, mi citas ekzemplon: dum la unua vintro tie, la hejtiloj en la hejmo ĉesis funkcii. Mi petis ke Humiko telefonu al kompanio por aranĝi riparadon. Ni devis atendi sufiĉe longan tempon sen hejto ĝis oni sendis ripariston. Kiam la viro alvenis, li tute ne volis serioze paroli kun “nur servistino” kaj samtempe provis trakti min kiel “stultan gajjin.” Do ni decidis ke mi parolu al Humiko en Esperanto kaj ke ŝi rekte traduku al li la vortojn kiel de “altrangulino”. Ŝi tuj ŝanĝiĝis, eĉ la voĉo subite sonis ‘samurajeca’ – ordonante lin ĉesigi sian sintenon kiel trakti nin kaj tuj decidi ĉu li kapablas reparaĵi ..... La ŝanĝo en ŝia prezentado estis tiel subita kaj serioza ke mi preskaŭ ridegus. Tamen, mi ne ridis kaj la riparisto tuj turnis sin al la riparado. Esperanto sukcesis solvi la interkulturajn problemojn.

– **Lusi HARMON (Usono)**

(redaktaj notoj)

1. Ges-roj William kaj Lusi Harmon loĝis en Tokio, Japanio pro la profesia laboro de William, ĉ. 3 jaroj de 1972, kaj ili havis bonan kontakton kun japanaj esperantistoj.

